

Eduard Ebel,  
Ŝvebas neĝ el aer'

*tradukita de Joachim Gießner*

Ŝvebas neĝ' el aer',  
nun ripozas la ter'.  
Mondo en brilblanka vest',  
ĝoju, ja venos kristfest'.

Varma lum' en la kor',  
for ĉagreno kaj plor',  
ĉesas de l' viv' la molest',  
ĝoju, ja venos kristfest'.

Baldaŭ nokto de l' glor'.  
Kaj el ĉielo la ĥor  
Sonos en dolĉa majest',  
Ĝoju, ja venos kristfest'.

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, \*1839 - †1905) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 - †2003-11-25).*

MR-012-JG-1 / Arg-99-200  
(2012-12-24 16:27:56)

MR-012-JG-1

Eduard Ebel,  
Neĝas nun ĉie ĉi

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Neĝas nun ĉie ĉi,  
lagon kovras glaci',  
brilas kristnaske arbar'.  
Ĝoju vi, ho kristanar'!

Varma estas la kor',  
malaperas dolor',  
venas savant' de l' homar'.  
Ĝoju vi, ho kristanar'!

Malleviĝis la sun',  
sankta nokt' estas nun,  
kantas por ni anĝelar':  
Ĝoju vi, ho kristanar'!

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, \*1839 - †1905) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

Arg-99-199 (2003-12-11 08:30:04)

MR-012-3

Eduard Ebel,  
Flustre falas la neĝ  
,

*tradukita de Josef Kühnel*

Flustre falas la neĝ'.  
Lag' rigidas laŭ leĝ'.  
Kristfeste brilas arbar'.  
Ĝoju pri Kristo, homar'!

Varma estas en kor'.  
Foras ĉiu dolor'.  
Fuĝas la vivoamar'.  
Ĝoju pri Kristo, homar'!

Sankta nokta lumbril'  
kaj ĉiela jubil'  
logas laŭ ĉarma fanfar':  
Ĝoju pri Kristo, homar'!

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, \*1839 - †1905) en Esperanton de Josef Kühnel.*

MR-012-JK-1 / Arg-99-202  
(2010-09-18 19:50:56)

MR-012-JK1